# STARTO

# N-ro 4/2006 (221)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**Niaj gejunuloj dum la asocia konferenco
en České Budějovice
22.-24. 9. 2006**

☆ Starto ☆
organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 3 eŭroj aerpoŝte),
**rete Starto:** malovec@volny.cz,
**rete ĈEA:**
cea.polnicky@quick.cz (sekretario)
melicharkova@quick. cz (prezidanto)
www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IČO de ĈEA:** 00 44 30 34

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
195 230 825 / 0300
Poštovní spořitelna Poděbrady

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz (reprezentace ČES, koordinace, vnitřní vztahy, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA)**: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, odborná aplikace esperanta, vydavatelská činnost, EU, retkomunikoj)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (muzeum)

**Sekretario**: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz (členská základna, účetnictví)

**Komitatano:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (kluby, konference, zápisy, čestní členové)

**Komitatano:** Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104, vanekmi@centrum.cz,
(sekce, komise)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., stepanova.v@kr-ustecky.cz; Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef-hron@volny.cz, tel. 466 401 942;
Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz.

**Kontrollegis:** Z. Hršel kaj la komitato

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek,
jarkacejkova@centrum.cz

# ĈEA konferencis

En la sudbohemia regiona urbo České Budějovice okazis inter la 22-a kaj 24-a de septembro 2006 la 12-a asocia konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiun partoprenis 101 personoj.



La universitata komplekso disponigis ĉefan konstruaĵon kun du klasĉambroj kaj aŭlo, kiuj provizore ricevis nomojn Tomáš Pumpr, Josef Vondroušek kaj L. L. Zamenhof. La loĝadon oni trovis en kelkdek metrojn proksimaj studenthejmoj, kiujn ligis tegmentita trotuaro, sur kies fino staris studenta manĝejo, ŝanĝita portempe al konferenca manĝejo. En vestiblo antaŭ la aŭlo estis eksponitaj libroj de libroservo, kie oni povis ankaŭ aĉeti kafon aŭ teon.



La vendreda vespero estis dediĉita al instruado de Esperanto, gvidata de Tomáš Břicháček kaj Dáša Chvátalová en la salono Vondroušek, kaj al rememoroj (en la salono Pumpr) pri la kongresoj en Florenco kaj Sarajevo (junulara) kaj pri IKUE-kongreso en Velehrad k. s. Interesa estis vizito de tridekjara viro, pranevo de Tomáš Pumpr, kiu rakontis pri sia praonklo kaj pri sia renkontiĝo kun la nomo de Petr Ginz - li estis en Hispanio ĝuste kiam aperis la hispana traduko de *Taglibro de mia frato*. Prezentita estis ankaŭ kantado ĉe gitarludo kaj fabelfilmo kun esperantlingvaj subtekstoj preparitaj de la junularo.



Sabate la ĉefan konferencan programon en la aŭlo Zamenhof malfermis malgranda koncerto de Miroslav Smyčka, poste sekvis raportoj pri ekonomio kaj aliaj aferoj de la asocio. Posttagmeze la plejparto da konferencanoj promenis tra la urbo, nur kelkaj restis en la salono Pumpr

por diskuti pri la iniciato ELFO (Esperantologia kaj literaturo forumo). La historia parto de la urbo estas vere vidinda, precipe la granda kvadrata placo kun pitoreskaj historiaj domoj, fontano en la mezo kaj iom flanke Nigra Turo kun 225 ŝtupoj, kies supro donas belan panoramon de la ĉirkaŭaĵo. Interesa estis ankaŭ konservita stacio de ĉevala fervojo el la 1840-aj jaroj. La sabata vespero finiĝis en picejo proksime de la universitato, kie estis preparita solena vespermanĝo, poste dancado kun riĉa tombolo.



*Dum la konferenco estis aplikata projekciado, ofte rekte el la interreto*

Dimanĉe matene oni daŭrigis Esperanto-kurson kaj samtempe en la apuda klasĉambro estis prezentita agado de la sekcio de informadiko, poste estis prezentitaj plej interesaj esperantlingvaj retejoj. Precipe maljunaj esperantistoj unuafoje vidis, kiel la interreto funkcias, ĉar la komputilo, per anteno ligita rekte al la reto, projekciis lumbildojn sur grandan muran ekranon. Poste estis projekciata subtekstita komedia filmo kaj propaganda TEJO-filmo pri Esperanto en la moderna mondo.

*Miroslav Malovec*



*Libroservon kaj Bibliotekon de la asocio prizorgas geedzoj Anna kaj Jiří Vyšinka el Vracov - sian funkcion ili plenumis ankaŭ dum la konferenco.*



*En la picejo*

# La konferenca traktado

La konferencan traktadon sabate matene en la aŭlo Zamenhof inaŭguris asocia vicprezidanto Jiří Tomeček per salutoj de la urbestro D-ro Miroslav Tetter kaj de la prorektoro de la Sudbohemia Universitato Prof. Vladimír Papoušek.

Post mallonga koncerteto de Miroslav Smyčka prezentis raporton pri la agado de la asocio prezidantino Jana Melichárková. Ŝi substrekis neceson ŝpari monon, laŭdis kasiston Vratislav Hirš, ke li senpage prizorgas la asocian kontadon, kaj la geedzojn Vyšinka, ke ili senkoste disponigis al la asocia biblioteko ne nur spacon, sed ankaŭ sian laboron. Al dumvivaj membroj ŝi dankis pro donacoj kaj tralegis leteron de la ministerio pri instruado.

Kasisto Vratislav Hirš priskribis la asocian membrobazon (el 778 membroj ni havas 364 dumvivajn asocianojn) kaj problemojn kun la nova sistemo de kontado (duobla).

Vicprezidanto Petr Chrdle raportis pri internaciaj rilatoj de ĈEA, prezentis la estraron de UEA kaj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), rakontis pri UK-oj en Florenco kaj la venontjara en Jokohamo kaj pri graveco de regulaj konsultiĝoj de mezeŭropaj E-asocioj.

Věra Podhradská raportis pri agado de Esperanto-kluboj kaj Miroslav Vaněk pri asociaj sekcioj.

Pri la agado de la katolika sekcio kun 168 membroj informis la prezidanto Miloslav Šváček. Ĉiujare estas eldonataj kvar numeroj de Dio Benu en 320 ekzempleroj jam dum 16 jaroj, por nevidantoj oni prizorgas sonregistradon. Somere okazis en Velehrad la 59-a kongreso de IKUE (104 kongresanoj el 11 landoj), preparata estas renkonto en Pollando, eldonita estis libro pri ĉeĥa kuracisto en Afriko, aperonta estas broŝuro pri Olomouc subtenata de la magistrato.

Marek Blahuš aludis refondiĝon de Ĉeĥa Esperanto-Junularo en 2005, renkontiĝon en Velehrad, junularan projekton Esperanto ĉe Interreto (E@I), kies unua DVD aperis somere, kaj informis pri novembra internacia trejnseminario en Brno „Lingvoj ĉe interreto“, por kiu li sukcesis akiri subtenon el EU. Li klarigis, ke ĈEJ akceptas ankaŭ plenkreskulojn kiel subtenantajn membrojn.

Ladislav Špína informis pri la agado de la fervojista sekcio, kiu aranĝas ĉiujare du konferencojn.

Josef Hron raportis pri la kontrolo de asocia mastrumado, kiun plenumis la asocia kontrolgrupo, kaj pri problemoj ligitaj kun duobla librotenado.

Anna Vyšinková priskribis prilaboradon de la asocia biblioteko kaj libroservo, kiujn ŝi transprenis en majo.

Jarmila Rýznarová informis pri agado de AEH, pri la seminarioj en Skokovy, pri la venontjara kongreso

de AEH kaj pri kunlaboro kun radio AKTIVA URUQAY.

Petr Chrdle invitis al siaj aŭtunaj aranĝoj, Internacia Paroliga Semajno (ImPaSem) kun internaciaj ekzamenoj, Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), informis pri ebleco aboni revuon „Esperantisto Slovaka“ kontraŭ 200 Kč ĉe Magdalena Feifičová kaj ke la premion „infanlibro de la jaro“ akiris „Arne, la ĉefido“, eldonita de KAVA-PECH en 2005.

Pavel Sittauer anoncis, ke la rekonstruado de la necesejoj kaj duŝejoj en Lančov estas finita, dankis al ĉiuj helpantoj kaj mon-kontribuantoj, invitis al la jubilea 55-a SET en 2007 kaj proponis Kilian-domon en Třebíč por negrandaj aranĝoj kun ebleco de tranoktado por kelkaj personoj.

Fine la kongreson salutis Inĝ. Tibor Kapencay nome de la slovakaj esperantistoj kaj informis pri la movado en Slovakio. *(vp + mm)*

## Ministeria letero

Vicministro pri edukado, junularo kaj korpedukado de Ĉeĥio D-ro Jaroslav Müllner en sia responda letero la 25-an de marto 2006 al nia asocia prezidantino Jana Melichárková klarigis la starpunkton de la mezeŭropaj landoj rilate la multlingvecon en Eŭropo kaj la eblan rolon de Esperanto.

Dum kunsidoj la 19-an de decembro 2005 en Bratislava kaj 16-an de februaro 2006 en Praha la slovaka delegitaro proponis utiligi kiel supernacian lingvon de eŭropa komunikado Esperanton, sed ĉar la tri aliaj delegitaroj ne identiĝis kun la ideo, la propono eĉ ne estis metita en la finan komunan rezolucion.

*„La ĉeĥa flanko (*delegita de la ministerio de eksterlandaj aferoj*) motivis sian starpunkton per tio, ke ĝi ne konsideras verŝajna sukcesan enkondukon de Esperanto kiel rimedo de internacia komunikado. La ĉeĥa delegitaro komprenas la avantaĝojn de planlingvo, kiu estas el multaj vidpunktoj pli facila kaj pli rapide lernebla kaj samtempe en sia funkcio estas aŭtonoma kaj politike neŭtrala. Sed ni opinias, ke ne eblas preteratenti la fakton, ke Esperanto ne estas geografie kaj historie-kulture ankrita kaj ne havas eĉ sufiĉan kvanton da parolantoj, ĉar laŭ plej kuraĝaj supozoj estas homoj, kiuj en la mondo parolas Esperanton, malpli multaj ol duonmiliono.*

*Argumentoj de esperantistoj do celas pli la eventualan potencialon, kiun la planlingvo havas, sed ili ne baziĝas sur la nuntempa reala situacio. Politikaj, organizaj kaj klerigaj problemoj, kiuj akompanus ĝian eventualan egalrajtigon kun la naturaj lingvoj, ne estas bagatelaj. Esperanto ankoraŭ devas pruvi sian kapablon servi je ĉiuj niveloj. Demando pri ĝia egalrajtigo kaj enkonduko kiel sola lingvo de eŭropa komunikado estas do minimume frutempa.“*

# Asocia Librokolekto*

1. Post transporto de ĉiuj libroj al Vracov ni decidis ellabori kompletan liston de ili. Entute temas pri ĉirkaŭ 2500 volumoj, sed surprizas, ke apenaŭ kvarono el ili havis registran numeron. La ceterajn titolojn verŝajne neniu eĉ trafoliumis. Nur tiel eblas klarigi, ke ne estas registritaj libroj kun aŭtoraj dediĉoj de tiaj gravuloj, kia estis Jan Masaryk!

2. Ni konstatis, ke en unu biblioteko kunvenis pluraj sistemoj de klasado kaj numerado, tial necesos la registradon unuigi, por ke povu enviciĝi novaj libroj, kiuj estas enskribitaj nur en la libro de novaj akiraĵoj sen atribuitaj registraj numeroj,

3. Ĉar la librojn neniu prunteprenas, necesas prikonsideri, ĉu la ekzisto de la biblioteko havas sencon, kaj cerbumi, ĉu ĉi tiu librotrezoro ne povu funkcii en alia formo,

4. En la kolekto troviĝas libroj, kiuj ne estas Esperantlingvaj kaj havas nenion komunan kun Esperanto, sekve indas prikonsideri ilian forigon el la kolekto

5. Miaopinie mankas alveno de novaj libroj, devus esti prestiĝa afero de ĉiu eldoninto de esperantlingva literaturaĵo, ke li donacu al la asocia librokolekto almenaŭ unu ekzempleron; paradoksas, ke la reprezenta biblioteko, per kiu ni povus fieri, ne posedas librojn, kiuj normale troviĝas en la merkato (nun kaj en la pasinteco).

6. Ne eblas senfine akceptadi pluajn librojn, necesas klaraj reguloj, kiom da ekzempleroj de unu titolo la librokolekto bezonas, superfluas havi ĝin en dudeko aŭ pliaj ekzempleroj.

7. Estonte ni planas disponigi al ĉiu klubo kompletan liston de libroj kaj gazetoj, kiujn posedas la asocia librokolekto, por iomete bremsi novajn donacantojn de libroj aŭ gazetoj, por ke la samaj titoloj ne amasiĝu.

8. Dankon meritas heredaĵo post Eva Seemannová, kiu riĉigis nian librokolekton per multaj tre valoraj libroj, precipe poeziaj kaj dramaj, kaj kio estas plej interesa kaj valora, multaj libroj en si kaŝas dediĉon aŭ subskribon de la aŭtoro - tiuj libroj havas eksterordinaran valoron kaj kreos oran bazon de nia librokolekto.


*Anna Vyšinková*
*Kollárova 131*
*696 42 Vracov*
*tel:**518 628 155***
***anjivy@seznam.cz***

* *La asocia komitato decidis, ke la biblioteko portos oficialan nomon Librokolekto.*

# 100-jara jubileo de Kořínek kaj Pumpr

Inter la 8-a kaj 10-a de decembro 2006 la 18-a Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem festis la 100-an naskiĝjaron de niaj du grandaj Esperanto-tradukantoj, Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr, kiuj naskiĝis en du sinsekvaj tagoj.

**Jiří Kořínek** naskiĝis la 1-an de oktobro 1906 en Liberec kaj mortis la 4-an de novembro 1988 en Ústí



nad Labem. Komence li laboris kiel komerca komizo en Liberec, ekde 1931 en tekstila grandkomercejo en Brno, dum la Dua mondmilito devige laborigita en fandejo. Post la milito li revenis al sia origina profesio, en 1964 li transloĝiĝis al Ústí nad Labem, kie li laboris ĝis sia pensiuliĝo kiel kontrolisto de kvalito en la entrepreno Textil Liberec.

En 1922 kiel studento li konatiĝis kun Esperanto. Ekde 1949 ĝis siaj lastaj tagoj li dediĉis milojn da horoj al pacienca laboro de tradukanto. Multegaj tradukoj estas dissemitaj tra gazetaro aŭ en manuskriptoj. Plej laste en la Régulo-festlibro Esperantismo li taksis sian verkaron kiel 500 originalajn kaj 550 tradukitajn poemojn kaj muziktekstojn. Nur ono el tio aperis libroforme. Li havas ankaŭ lokon en Esperanta antologio (1984) kaj en multaj revuoj, i.a. kiel gajninto de 18 literaturaj premioj. Nur du semajnojn antaŭ la morto Jiří Kořínek fariĝis la unua esperantisto, kiun la ĉeĥa ŝtato honorigis kiel "merithavan laboranton en kulturo“.

Inter liaj originaloj elstaras poemoj *Doktor Zamenhof*, *Romanco f-maĵora de Beethoven*, *Skizoj de Usedon* kaj eseoj *Problemoj de tradukado*, *Taskoj de nia literaturo beletra kaj faka, Esperanto kaj poezio, Reguloj de Esperanta fonetiko.*

Li tradukis poezion de ĉeĥaj kaj slovakaj poetoj kaj ariojn el operoj. Liaj plej ampleksaj tradukoj estas *Panjo* (J. Seifert), *Manon Lescaut* (V. Nezval), *Jakobeno* (Červinková /Dvořák), *Flugilhava ŝtono* (J. Karen), *Sur la sojlo de amo* (M. Procházková).



**JUDr. Tomáš Pumpr** naskiĝis la 2-an de oktobro 1906 en Dolní Slověnice kaj mortis la 10-an de septembro 1972 en Prago.

Esperantisto li estis ekde 1926, sian literaturan verkadon li komencis per kunlaboro al la *Ĉeĥoslovaka antologio* (Budapest, 1935), post

kiu sekvis *Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj* de K. J. Erben (1938). Plej grandan admiron ĝis nun vekas lia genia repoemigo de *La bapto de caro Vladimír* de K. Havlíček Borovský, en kiu li sukcesis redoni la satiran humuron de la originalo utiligante proprajn kvalitojn de Esperanto. Alia poemego de Havlíček *Reĝo Lávra* en lia traduko aperis en La Nica Literatura Revuo (31-32, l960) kaj lia traduko de *Majo* de K. H. Mácha aperis fragmente en diversaj revuoj, komplete nur en 1997 (deklarita de R. Rossetti kiel nekompareble supera al la angla traduko).

Por la *Simpozio pri ata/ita* redaktita de Kálmán Kalocsay li verkis 106-paĝan traktaton *Esperanto sen aspektoj?* (Stafeto, 1961). Li kunlaboris teksto-traduke kaj nomenklature ĉe la eldono de *Poŝatlaso de la mondo* en Esperanto (1971) kaj tradukis la informan broŝuron *Mallonge pri Ĉeĥoslovakio* (1966). El Esperanto li ĉeĥigis la *Konstitucion de Japanio* por la ministerio de internaj aferoj. Post la Dua mondmilito Pumpr kunlaboris kun la esperantlingvaj art-elsendoj de la Verda Stacio Praha per vico da tradukoj ekz. *Somera firmamento* de Z. Jirotka (1948), *Gracoplena Jesu-Infano* de Prago de Fr. Kožík, *Fantomo en la kastelo* de M. Šrámek, ambaŭ en 1948, *Maja fabelo* de V. Mrštík (1950). Inter ili elstaris tradukoj de la oper-tekstoj de *Vendita fianĉino* de Sabina (muziko B. Smetana) kaj *Najado* de J. Kvapil (muziko de A. Dvořák) kaj *En la puto* de Sabina (muziko V. Blodek). Por la nacilingva programo de la radiostacioj Praha kaj Ostrava d-ro Pumpr enĉeĥigis la nederlandan dramon *La mondo ne havas atendejon* de M. Dekker el esp. traduko de F. Faulhaber.

En 1962 li fariĝis akademiano.

**Kunlaboro.** Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr pri kelkaj tradukoj kunlaboris. Ankoraŭ kun Rudolf Hromada ili esperantigis *Sileziajn kantojn* de Petr Bezruč kaj en manuskriptoj konserviĝis iliaj tradukoj el la plej malfacila el la ĉeĥaj poetoj Otakar Březina. Jiří Kořínek elĉeĥigis 20 liajn poemojn, Tomáš Pumpr 8. Jen du specimenoj el iliaj tradukoj de O. Březina:

*El tradukoj de J. Kořínek*

**MIA PATRINO**

Kun trist' de pentulin' patrino mia iris
tra vivo sen kolor', sen florodor', sen helo,
ŝi sekajn fruktojn nur de vivoarbo ŝiris,
kun cindra gusto kaj sen refreŝiĝ' sub ŝelo.

*El tradukoj de T. Pumpr*

**DITIRAMBO DE L' MONDOJ**

Tapiŝoj de misteraj ŝtupoj!
Pulsoj de rejuniga sango.
Ĉiam kaj ĉiam revenantaj,
ĉiam pli spirite tondrantaj
uraganoj de pasioj!

## 5-a KONGRESO de AEH-IKEH

### en JUNIORCENTRO SEČ, Ĉeĥio

La kvina kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj okazos de la 30-a de majo ĝis la 3-a de junio 2007, 30 km sude de la urbo Pardubice en la urbeto Seĉ. La kongreso okazos en senbariera moderna konstruaĵo de Juniorcentro. Ĝia areo de 30 hektaroj troviĝas en belega regiono de Fer-montaro, ĉe la bordo de granda lago kaj proksime de akvo-valbaraĵo (42m alta digo).

## Kongresa temo: Ne estu sola

Oficiala programo de la kongreso estas planata nur por unu tago, dum la konferenco vi aŭskultos raporton pri la agado de AEH kaj pri planoj por estonto kaj okazos elekto de la nova komitato AEH. Plua programo antaŭvidas interesajn prelegojn, videofilmojn, kultur-amuzan programon kaj ekskursojn.

La tranoktado por 70 personoj estas certigita en 2- kaj 3-litaj ĉambroj. Ĉiam du ĉambroj havos komunan higienan ekipon. Manĝado okazos en apuda pavilono kun memservo. Taŭga ankaŭ por rulseĝuloj. La tuta regiono estas paradizo por turistoj. Multaj vojetoj ebligas interesajn piedajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵon. La busekskurson oni direktos aŭ al la monumenta katedralo en Kutná Hora kaj al ostejo Sedlec aŭ al la burgruino Lichnice, Třemošnice, akvobaraĵo Pařížov, al urbo Pardubice, monto Kunětická Hora kaj reen.

**Ĉeĥaj membroj:** Aliĝkotizo: 50,-Kč, kongreskotizo, tranoktado kaj manĝado, por la tuta tempo entute 1.800 Kč

**Eksterlandanoj:** Aliĝkotizo 10 eŭroj, kongreskotizo, tranoktado kaj plena manĝado, por la tuta tempo entute 100 eŭroj


La busekskurson oni pagos aparte - laŭ interesoj (la prezo estos proksimume 100 - 150,.-Kč) Detala programo kun horaro de busoj de la stacidomo en Pardubice estos sendita al seriozaj interesiĝantoj en aprilo 2007.

Aliĝilojn bonvolu sendi al nia adreso kun aliĝkotizo plej malfrue ĝis fino de februaro 2007. Aliĝi eblas ankaŭ per ret-adreso aeh-ikeh@volny.cz.

La aliĝilon oni traktas kiel validan post ricevo de la aliĝkotizo, kiu estas ne repagebla.

Elkore invitas Vin Asocio de E-handikapuloj kun sia Internacia klubo en Pardubice, Na Okrouhlíku 953/21, Pardubice, Ĉeĥio.

En **aliĝilo** al la V-a kongreso de AEH-IKEH en Juniorcentro SEČ en la tagoj de 30.5.- 3.6.2007 skribu vian nomon, precizan adreson, naskiĝdaton, per kio vi pretas helpi al la programo, eventuale viajn notojn, proponojn k.s. Ĉe via subskribo notu ankaŭ la daton.



# Projekto Eklaboru!

En la interreto aperis nova projekto *Eklaboru!* ĉe **www.eklaboru.com**, kie povas sin registri tiuj, kiuj serĉas aŭ proponas laboron. La projekto startis la 15-an de novembro 2006 kaj jam post du semajnoj registriĝis 157 homoj kaj tri el ili trovis pere de ĝi laboron.

# InPaSem 2006

Dobřichovice apud Prago bonvenigis komence de oktobro (2.-8. 10. 2006) **Internacian Paroligan Semajnon,** kiun partoprenis precipe samideanoj el Francio. Tio ne estas hazardo. Fakte InPaSem estiĝis laŭmende de francaj fervojistoj kaj nur dum sekvaj jaroj ĝi malfermiĝis ankaŭ al aliaj kaj tiel ĝi fariĝis internacia.






La partoprenantoj komence libervole elektis, en kiun grupon ili aliĝu. Komencintoj havis kurson de Esperanto, kiun per Ĉe-metodo brile gvidis Stano Marček el Slovakio. Jamaj parolantoj povis elekti inter du paroligaj seminarioj: unu estis gvidata de Petro Chrdle (Ĉeĥio), la alia de Albrecht Kronenberger el Germanio. Sed oni ne nur lernis. La lecionoj daŭris ĉiutage nur de la 9-a ĝis la 12-a kun unu paŭzo, sekvis kantado de Esperanto-kantoj (komune ĉiuj grupoj) kaj post la tagmanĝo sekvis turisma kaj kultura programoj, plejparte en Prago. Ĉio-ĉi okazis ankaŭ en Esperanto (nur por francaj komencantoj interpretis Jean Ripoche), do ĉiuj travivis kompletan semajnon en Esperanto-medio.

Paralele kun InPaSem okazis dum la lastaj tri tagoj Internaciaj Ekzamenoj de ILEI / UEA, dum kiuj sukcesis 5 el 6 kandidatoj. Kaj interesatoj partoprenis sabate posttagmeze Ekumenan Diservon en Esperanto, kiun kungvidis reprezentantoj de tri plej fortaj eklezioj en Ĉeĥio: katolika, evangelia kaj husana.

La ekzamenan komisionon konsistigis Stefan MacGill, Albrecht Kronenberger kaj Miroslav Malovec. Al la ekzameno aliĝis tri francoj (jam aĝaj personoj) kaj tri ĉeĥaj gejunuloj (Dáša Chvátalová, Tomáš Břicháček kaj Tomáš Klapka).



*Promenon tra Prago gvidis juna esperantisto Dan Mrázek.*

Entute partoprenis 28 partoprenantoj el 3 landoj (CZ, FR, DE). Kaj por la interesatoj mi aldonu: la venonta InPaSem okazos unu semajnon pli frue, do de la 24-a ĝis la 30-a de septembro.

# Junulara trejnseminario „Lingvoj en Interreto“



De la 4-a ĝis la 10-a de novembro 2006 okazis en Brno trejnseminario kun la temo „Lingvoj en Interreto“, kiun okazigis Ĉeĥa Esperanto-Junularo kunlabore kun E@I (Esperanto ĉe Interreto, faka sekcio de TEJO), pli konkrete Marek Blahuš, Dáša Chvátalová kaj Peter Baláž. La seminarion, kiun finance subtenis la EU-programo „Youth“ (Junularo), ĉeestis 19 gejunuloj kaj 4 trejnistoj el 9 landoj (Brazilo, Ĉeĥio, Danio, Germanio, Hungario, Kanado, Litovio, Pollando, Slovakio).



La partoprenantoj estis dividitaj je komencantoj pri Interreto kaj spertuloj. Ili okupiĝis pri kreado de retaj paĝaroj kaj retaj vortaroj, sed ne forgesis ankaŭ la kulturon. Post trarigardo de la urbaj vidindaĵoj (kun helpo de lokaj esperantistoj) en internacia vespero ĉiuj samnacianoj prezentis sian nacion. Danke rektan ligon al Interreto projekciata sur la muro ĉiu montris mapon de sia lando, koncize priskribis ĝian historion kaj prezentis tipajn manĝojn. Ekzemple Ĉeĥion reprezentis ĉeĥaj buĥtoj, fromaĝoj de Olomouc, kukumoj de Znojmo, bieroj Pilsner, Budvar, Starobrno, kelkaj vinoj, kofolo kaj la plej granda ĉeĥo - pluŝa figureto de Talpo.



La prelegoj temis pri HTML, Java Script, CSS, grafika aspekto de la paĝaro, multlingvaj paĝaroj, administrado de Linuks-serviloj kaj Flash-kreado. Poste 13 gejunuloj partoprenis en KAEST Dobřichovice. *-red.-*

# KAEST 2006

Inter la 12-a kaj 14-a de novembro 2006 renkontiĝis dum Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko en Dobřichovice kvindeko da esperantistoj, kiuj deziras evoluigi la fakan lingvaĵon en Esperanto. Inter ili estis 13 gejunuloj, kiuj alvenis rekte el trejnseminario en Brno. Kelkaj el ili ankaŭ prelegis. Ekster la programo renkontiĝis ankaŭ membroj de ELFO (Esperantologia kaj Literatura Forumo), kiuj interkonsentiĝis kolekti vortojn mankantajn en la Kraft-vortaroj (kun helpo de ĉiuj esperantistoj) kaj daŭrigi prilaboron de Pumpr-katalogo de tradukoj el la ĉeĥa lingvo.



*Junaj KAEST-anoj*

Vendrede, post la oficiala malfermo de la konferenco, ricevis la vorton la unua preleganto, *Wera Blanke* (Germanio), kiu parolis pri **Prapioniroj de nia faka lingvo**, pri komencoj de Scienca Revuo kaj unuaj fakaj verkoj. Ŝia edzo *Detlev Blanke* en sia prelego **Bibliotekoj kaj arkivoj - kelkaj problemoj** skizis sorton de kelkaj libro-kolektoj, kiuj finiĝis kiel rubaĵo, dum aliaj laŭ kontrakto estos transprenitaj de ŝtataj bibliotekoj. La arkivoj ricevas ankoraŭ malpli da atento ol bibliotekoj, valoraj materialoj perdiĝas. La vesperon finis du junuloj, *Clayton Smith* (Kanado) kaj *Viliam Búr* (Slovakio), kiuj komune prezentis projekton **E@I seminarioj - bona ŝanco por junaj esperantistoj**. Esperanto ĉe Interreto (E@I) aranĝas ne nur seminariojn, sed eldonis ankaŭ kompaktan diskon DVD kun multaj interesaj legaĵoj kaj instruprogramoj. La slovaka junulo poste en prelego Internaciigo de komputilaj programoj priskribis problemojn dum skribado de plurlingvaj tekstoj en komputilo (ekz. vortaroj) kaj kiamaniere oni povas skribi literojn de ĉiuj lingvoj en la mondo.



La sabatan programon startigis *Marek Blahuš* (Ĉeĥio) per prelego **Unikodo – Esperanto de Interreto**, kiu parte daŭrigis la antaŭan prelegon pri plurlingva skribado de komputilaj tekstoj. *Pavla Dvořáková* (Ĉeĥio) en **Multlingvaj tradukvortaroj en Interreto** prezentis famajn retajn vortarojn, kiuj uzas Esperanton (Reta Vortaro, La Vortaro, Majstro, Ergane, Logos). *Alla Kudryashova* (Rusio) parolis pri **Lingvo de retaj reklamo kaj merkatiko**. Reklamo uzas diversajn lingvajn trukojn por aĉetigi aŭskultantojn. *Manfred Westermayer*

(Germanio) en sia prelego **Agendo 21 - Civitana Agado por Daŭrigeblo** priskribis la pintokonferencon 1992 en Rio de Janeiro pri Medio kaj Evoluo por solvi la plej urĝajn problemojn ekologiajn, ekonomiajn kaj socialajn de la homaro fronte al la 21-a jarcento.

La posttagmezan programon komencis *Jan Werner* (Ĉeĥio) per **Ĉarpentistaj lignoligoj** kaj iliaj terminologiaj malfacilaĵoj en Esperanto. *Tibor Kepencay* (Slovakio) okupiĝis pri **Nomenklaturo de la bazaj intensaj grandoj**. Pri sia granda komputila vortaro 100-mil-vorta informis *Josef Hron* (Ĉeĥio) en **Novaj spertoj en la kompilado de la Granda Vortaro Ĉeĥa-Esperanta**. En la lasta sabata prelego *Miroslav Malovec* (Ĉeĥio) konatigis la aŭskultantojn kun manuskripto **Maŝinelementoj** laŭ Ján Mužlay kaj Július Varinský, kiun li malrapide enkomputiligas.



*M. Blahuš, P. Dvořáková, Prof. R. Sachs*

Dimanĉe la aŭskultantoj aŭdis lastajn prelegojn: *Jan Niemann* kaj *Lene Niemann* (Danio) priskribis kriteriojn kaj procedon, kiel enskribi objekton en la Unesko-liston de mondaj naturaj heredaĵoj. Kiel ekzemplon ili prenis gronlandajn fjordojn en prelego **Sermeq Kujalleq – kiel fariĝi parto de la Monda Heredaĵo**. Vigla preleganto profesoro *Rüdiger Sachs* (Germanio) skizis **Medioprotektadon en Afriko**, kiam li antaŭ jardekoj kiel juna sciencisto laboris en la Serengetia Nacia Parko de Tanzanio, Orienta Afriko. *Frank Nitzsche* (Germanio) en **Sciindaĵoj pri la klimato en laborĉambroj** klarigis, kiel la klimato influas farton kaj laborkapablon. *Aida Čižikaitė* (Litovio) faris statistikan esploron pri **Uzo de nomoj en retbabilejoj: principoj de elekto** kaj kion la elektita kaŝnomo malkaŝas pri la kaŝita homo.



Fine la ĉeestantoj decidis okazigi la jubilean KAEST en 2008 (la unua AEST okazis en 1978, la unua KAEST en 1998). Ili ankaŭ verkis leteron al la pola ministrino de eksterlandaj aferoj:

*Ni, partoprenantoj de la Internacia Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko en Dobřichovice, alte taksas vian agadon kaj dankas al vi, ke ni havas eblon konatiĝi kun via lando, ĝia kulturo, ĝia literaturo kaj ĝia hodiaua realaĵo pere de esperantlingvaj elsendoj de Radio Polonia. Viaj programoj estas aŭdataj en ĉiuj kontinentoj kaj vere semas intereson pri via lando. Ni deziras al la programo la saman sukceson ankaŭ en la estonteco kaj esperas daŭre povi ĝui tiun ŝatatan servon de Pola radio internacia.*

-mm-

# Esperanto-monumento en Linz renovigita

Mardon, la 3-an de oktobro 2006 okazis solena inaŭguro de Esperanto-monumento en Linz, Supra Aŭstrio, ĉar la antaŭa monumento inaŭgurita en la jaro 1965 devis cedi al novkonstruo de moderna stacidomo de la ĉefa fervoja stacio en Linz. La moderne konstruita monumento fare de la magistro Helmut Egger el Peuerbach (kiu persone partoprenis la inaŭguron) estas 3 metrojn alta kaj estas konvene lokita maldekstre apud la ĉefa alirvojo al la stacidomo, do bone videbla de la ĉiutage preterpasantaj kelkmiloj da homoj.



*Romano Bolognesi*

La solenan inaŭguron partoprenis kelkaj oficialaj gastoj, reprezentantoj de la urbo Linz, E-organizoj kaj kelkdek esperantistoj el Aŭstrio kaj el najbaraj landoj Ĉeĥio kaj Italio. La inaŭguron tre simpatie enkondukis la vicurbestro de Linz, la kultura estro d-ro Erich Watzl. Li komencis per la vorto "SALUTON" kaj mallonge priskribis, kiel li - nove en sia laboro de la kultura respondeculo - tuj devis okupiĝi pri la fakto, ke la preskaŭ jam 40 jarojn ekzistanta kaj pro la novkonstruo de la stacidomo detruita kaj forigita E-monumento necesigas agi kaj serĉi solvon.

La urbestro d-ro Franz Dobusch ankaŭ esprimis la komencan nekomprenon, ke la E-monumento malaperis.

D-ro Romano Bolognesi, la prezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) skizis la historion de Esperanto kaj de la E-monumento en Linz. Poste la urbestro solene malkovris la Esperantomonumenton.

Por la Esperanto-asocio en Linz la prezidantino Greta Gössl esprimis dankon pro la novkonstruo fare de la artisto, magistro Helmut Egger kaj ankaŭ ŝi menciis meritojn de la iama estro de la ĉefsekcio en Linz, Johano Geroldinger, pri konstruo de la unua E-monumento en la jaro 1965. La solenaĵon oni finis per la Esperanta himno en prezento de la solene vestitaj lokaj muzikistoj.

Okaze de la 40-jariĝo de la unua Esperanto-monumento en Linz estis eldonita poŝtmarko.

*Jindřich Tomíšek,*



*La IFEF-prezidanto d-ro Romano Bolognesi (maldekstre) kaj la urbestro de Linz d-ro Franz Dobusch (dekstre)*

# Ĉe aŭstriaj fervojistoj

(Jarkonferenco de AFEF en Vieno)

En la tagoj de la 6-a ĝis la 8-a de oktobro 2006 okazis en Vieno regula jarkonferenco (okazanta ĉiun duan jaron) de Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio (AFEF) kun partopreno de eksterlandaj gastoj el Ĉeĥio kaj Hungario.

La laboran parton de la konferenco okazanta en la klubejo de AFEF (en proksimeco de la stacidomo *Südbahnhof*) inaŭguris la AFEF-prezidanto ing. Walter Huber, kiu sen interrompo jam 39 jarojn sukcese gvidas la landan asocion. Post la bonvenigaj vortoj oni rememoris la forpasintajn membrojn kaj omaĝis ilian memoron per unuminuta silento. Sekvis salutparoloj de la gastoj - en la nomo de IFEF kaj Hungara Fervojista Esperanto-Asocio salutparolis Inĝ. István Gulyás, por Ĉeĥa landa asocio de IFEF ĉe FISAIC ČD Jindřich Tomíšek. Sekvis raportoj de la AFEF-funkciuloj pri ilia agado inter la konferencoj, reelekto de la komitatanoj (ĉiuj ĝistiamaj estis reelektitaj) kaj prezento de laborplano por venonta periodo.

Sabate ni estis gvidataj de la AFEF-prezidanto ing. Walter Huber tra Vieno por interkonatiĝi kun kelkaj (iuj ĝis tiam nekonataj de ni) memoraĵoj kaj memor-objektoj de la ĉefurbo kaj ni vizitis la moderne gvidatan per komputiltekniko Esperantomuzeon kaj Kolekton por Planlingvoj en Palais Mollard, Herrengasse 9, sub ĉiĉeronado mem de ĝia direktoro, magistro Herbert Mayer. La muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj estas parto de Aŭstria Nacia Biblioteko. En la muzeo funkcias elektronika katalogo Trovanto, kun Esperanto kiel serĉlingvo. Oni povas serĉi laŭ aŭtoroj, titoloj, temoj kaj aliaj kategorioj jam pli ol 35 mil dokumentojn, spekti filmojn informantaj pri Esperanto kaj en Esperanto (sed ankaŭ en aliaj pli vaste uzataj lingvoj laŭ elekto) kaj simile. Vespere post grupa vizito de la amuzparko Prater ni komune vizitis la fame konatan restoracion "Schweizerhaus" en Prater, kie ni krom gustumado de la specialaĵoj amuziĝis kaj babilis.

En la indikita tago la 7-an de oktobro 2006 enkadre de "Longa nokto de la muzeoj" vizitis la muzeon krom nia grupo aliaj 1655 vizitantoj. Tiu ĉi rezulto montras kreskantan interesiĝon pri Esperanto (malgraŭ la hegemonie preferata angla lingvo) kiel viva, neŭtrala kaj facile lernebla internacia lingvo, kiu multe pli facile kaj malplikoste povas solvi la problemojn pri multlingveco kaj bezonata multekosta tradukado (ol la hegemonie entrudata angla) en ĉiuj internaciaj organizoj kiel UNO, Unesko, Eŭropa Komunumo kaj aliaj.

*Jindřich Tomíšek*
*ĉefkomitatano de IFEF*

## Jan Řepa ĉe elektoj en Hungario

Hungara esperantisto János Paszabi, zorganta pri minoritatoj kaj lingvaj rajtoj, invitis nian ekskomitatanon Jan Řepa kiel akredititan observanton sub n-ro 40490 al komunumaj elektoj en Budapeŝto la 1-an de oktobro 2006. Siajn impresojn J. Řepa diris por la Slovaka Televido ST2 - festega etoso, rektaj elektoj de la urbestro sen koruptado.

# Nenašli jste slovíčko?

**Dodatek k česko-esperantskému slovníku Karla Krafta.** Při setkání členů Esperantologického a literárního fóra (ELFo) v Českých Budějovicích 23.9. 2006, pan Karel Kraft požádal přítomné, aby se někdo z nich ujal práce na dodatku jeho slovníku, vydaného v roce 1998. Současně dal k dispozici dosud shromážděný podkladový materiál. Koordinátoři aktivit ELFo výzvu přijali, v současnosti hledají vedoucí osobu zpracovatelského kolektivu, který shromáždí potřebné chybějící výrazy, nalezne jejich esperantské ekvivalenty, a připraví je k vydání. Aby dodatek obsahoval všechny pojmy, které čeští esperantisté potřebují, vyzývají k součinnosti všechny členy ČES. Kdykoliv v následujícím roce 2007 v Kraftově slovníku nenajdete potřebné slovo nebo vazbu, zaznamenejte je a pošlete v českém znění, případně i s návrhem na esperantský ekvivalent, na kontaktní adresu ELFo (prozatím): malovec@volny.cz, příp. na poštovní adresu: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno.

## EK Znojmo 50-jara

Sabate la 25-an de novembro 2006 Esperanto-klubo ĉe Domo de Infanoj kaj Junularo en Znojmo festis sian jubileon. La klubo estiĝis en 1956 en *Dům osvěty* (nun *Beseda*), multaj membroj devenis el Moravské Budějovice. Dum la duonjarcento la klubo preparis ekspoziciojn, renkontojn, s-ano Rotrekl gvidis infanojn. En la jaro 2000 la klubo gastigis konferencon de ĈEA, dum kiu estis plantita Esperanto-arbo. La historion de

-------------------------------------------------------

la klubo priskribis ĝia prezidanto Stanislav Bršlica. La kunvenon ĉeestis ankaŭ redaktorino de la loka ĵurnalo *Znojemský týden* (Semajno en Znojmo) Dagmar Dřevojanová, kiu alportis riporton kun pluraj fotoj kaj konciza historio de la klubo. *-red-*

# UMEA Jubilea Subtenanto

En la jaro 2008 UMEA festos sian 100-jaran fondiĝdatrevenon. El tiu okazo UMEA invitas kaj petas, ke vi estu Jubilea Subtenanto de UMEA. La kotizo estas 100 eŭroj. La subtenantoj ricevos la ĵus aperintan pli ol 500-paĝan Esperantan-Anglan Medicinan Terminaron, abonon por nia organo Medicina Internacia Revuo (2007-2008) kaj en la jaro 2008 memorinsignon kaj memordiplomon. La Subtenantoj favorpreze rajtos partopreni nian jubilean festan konferencon en Krakovo (Pollando). Pri la aliĝoj, pagmanieroj, ktp. bonvolu demandi kaj skribi al D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA. HU-9002 Gyor, Pf. 143. Hungario, rete: iferdr@t-online.hu

*Kun koraj salutoj:*

*D-ro I. Ferenczy*

## Omaĝe al Milan Zvara

La devualo de MEMORTABULO al inĝ. Milan Zvara okazis la 30-an de novembro en 2006 je 14.30 horo en la "Parko de Milan Zvara" apud Istrobanka ĉe rivero Poprad.

# Ankaŭ Esperanto aperis dum Expolingua

La 10-an de novembro 2006 okazis en Prago kaj aliaj eŭropaj urboj Expolingua – granda lingva foiro kun multaj komercaj ofertoj kaj nekomercaj prelegoj. Multaj organizoj priparolis sian agadon kaj montris al publiko, kiel eblas uzi iliajn servojn. Plejparte temis pri vojaĝagentejoj kunligitaj kun eksterlandaj lingvolernejoj, uzantaj precipe la anglan. Unu el la prelegoj, kiu tute malsamis de la pasintaj, estis ĝuste tiu pri Esperanto. Je dispono estis ĉirkaŭ 50 minutoj, Esperanton prezentis Dáša Chvátalová kaj Miroslav Vaněk.




Uzante komputilon kaj projekciilon ni povis montri la bazon de Esperanto al ĉiuj, kiuj interesiĝis. Ni priskribis fundamentan gramatikon, malgrandan parton de vortprovizo, eblojn por ludi kun la lingvo kaj ĝia strukturo kaj memkreadon de vortoj por esprimi ĉion. Kompreneble ni ofertis ankaŭ multajn ligilojn por trovi informojn pri kaj en Esperanto, ni montris, kie trovi lingvokursojn kaj literaturon, kie krozi en Interreto. Emfazita estis Esperanto-kulturo kaj malfermeco al ĉiuj por ĉiu ajn homagado.




Fine oni disdonis kuketojn kun Esperanto-signoj, por ke partoprenintoj memoru kaj rememoradu bone tiun ĉi prezenton. Praktike oni povis tuŝi kaj trarigardi librojn, lernolibrojn, vortarojn kaj gazetojn en Esperanto.

Ege sukcesa montriĝis la eldono de la broŝuro PakEo, en la ĉeĥan tradukita informmaterialo pri Esperanto enhavanta ĝeneralajn informojn, bazan gramatikon, ekzercareton kaj vortareton – ĉion sur 4 folioj de papero. PakEo estis prilaborata de Ĉeĥa Esperanto-Junularo, kiu ĝin ankaŭ eldonis.

La prelegon partoprenis ĉ. 30 personoj, plejparte geesperantistoj kaj kelkaj neesperantistoj. Bedaŭrinde

venis nur malmulte da gejunuloj, kies aĝgrupo estis celita.





Ni pripensas partopreni la lingvan merkaton ankaŭ venontjare, esperante ke venos pli multe da gejunuloj kaj neesperantistoj kaj pli multe da homoj eklernos Esperanton por ĝui ĝiajn avantaĵojn.

Dankon al s-ino Milada Kolářová





(kiu desegnis bildojn uzitajn dum la prezento kaj bakis la kukojn) kaj al s-ro Petro Chrdle (kiu pruntedonis Esperanto-librojn).

*Dáša Chvátalová*



# Nova libro de Č. Vidman




Ĉeĥa kaj Esperanta poeto Čestmír Vidman verkis sian memorlibron *Než padne mlha docela* (Antaŭ ol nebulo falos tute), en kiu li priskribas sian vivon kaj dediĉas multajn paĝojn ankaŭ al Esperanto kaj esperantistoj. La titolo aludas lian malfortiĝantan vidkapablon, pro kio li tajpas preskaŭ blinde. La 386-paĝan libron por li redaktis Inĝ. Margit Turková, la eldonkvanton de 300 ekzempleroj verŝajne pagis la aŭtoro mem. La lastaj 70 paĝoj prezentas multajn fotojn kaj kopiojn de dokumentoj. Pri Čestmír Vidman kaj lia libro oni parolis mallonge ankaŭ en radio.

# Gratuloj

Ĉi-aŭtune festas siajn vivjubileojn du niaj honoraj membroj. La 11-an de septembro naskiĝis **Miroslav Smyčka** (1926), kies kantado akiris respekton ne nur en la operejo de Ústí nad Labem, sed ankaŭ en la Esperanto-movado dank' al multjara organizado de Kultura Festivalo en la sama urbo kaj dank' al koncertoj dum UK-oj kaj aliaj festaj okazoj. La 5-an de novembro festis sian naskiĝtagon **Linhart Rýznar** (1921), fondinto de kluboj en Svitavy kaj Polička, Ĉe-instruisto kaj magiisto, kiu per siaj magiaĵoj kontribuis al programo de multaj niaj kluboj.

# Esperanto iom alimaniere

estas nomo de publika tutvespera programo, kiu okazis en la Hi-fi-klubo en Klatovy, konata centro de kulturaj kaj klerigaj aranĝoj en la urbo, la 20-an de novembro 2006 kaj kiun peris Věra Muchnová el Strakonice kaj preparis kaj gvidis Pavla Dvořáková el Písek.

Parolado, orientita precipe al kulturaj valoroj de Esperanto, estis kompletigita kaj vivigita per projekciado de dokumenta filmo pri Esperanto el la nova CD-ROMo, komentita fotoprezentado de la Internacia renkontiĝo de E-familioj, okazinta ĉi-julie en Pilský Mlýn ĉe Blatná, sonspecimenoj de la klasika muziko en Esperanto (ario el la opero „Najado“ de Dvořák, inkluzive la enkondukajn vortojn de Karel Höger , ario el la opereto „Cigana barono“ de Strauss kantita de s-ano M.Smyčka, Halleluja el la oratorio Mesio de Händel, kantita de la 100-membra universitata koruso el Budapeŝto), poemdeklamo, solprezentado de muzikigita E-poezio kaj komuna kantado de konataj kantoj en E-traduko kun gitara akompano. Tiun ĉi aranĝon en hejmetosa medio partoprenis krom organizantoj pli ol 20 gastoj kaj ĝi estis akceptita kun favora reeĥo. La programo inkluzive la finan diskuton daŭris 3 horojn kaj laŭ la reago de la aŭskultantoj estis evidente, ke la plejparto de la informoj pri kvalitoj kaj eblecoj de utiligo de Esperanto estis por ili tre surpriza.

La aŭtorino de la programo volonte partumos siajn spertojn kun eventualaj pluaj interesiĝantoj pri organizado de similaj aranĝoj ankaŭ en aliaj urboj kaj komunumoj. Kontakto: PhDr. Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek aŭ pavladvorakova@tiscali.cz

# 56-a kongreso de KELI Strážné la 12-an –19-an de aŭgusto 2006

*Non multa, sed multum*, diras la latinparololoj. Kvardek kristanoj el dek landoj pasigis unu semajnon en belega parto de nia patrujo, en Karkonoŝo. Kelkaj konis la germanan nomon Rübezahl, sed ne sciis, ke li ĉeĥe nomiĝas Krakonoš, kaj estas spirito de nia plej alta montaro Karkonoŝo – Gigantmontaro. Bedaŭrinde lia protekto de nia naturo en nunaj materialismaj tempoj ne sufiĉas, do la konferenco temis pri la protekto de la naturo. Sed la interesoj de kongresanoj estis pli larĝaj. Ni eksciis detalojn pri Kolombo kaj lia malkovro de Ameriko, interesaĵojn pri Rembranto, kaj pri nia ne tre konata meritulo Přemysl Pitter. Libroj pri li estis vendeblaj kaj aĉetitaj. Ni alkalkulu belan unutagan ekskurson al Harrachov – la vitrofarejo kaj ĝia bierfarejo kaj muzeo; la urbovida vojaĝo en elektra vagonareto, (bedaŭrinde pluajn kurtajn promenadojn en la ĉirkaŭaĵon de Strážné la vetero ne ebligis), plue ni memoru posttagmezan viziton kaj trarigardon de la urbo Vrchlabí kun belega orgena koncerto de Ernest Leuze en la monaĥeja preĝejo, vesperan koncerton de geedzoj, esperantistoj Jelínek el Jilemnice, interparolon kun la vilaĝestro de Strážné, komunajn unuiĝojn ĉe nia Sinjoro Jesuo, enpensiĝojn ĉe la Biblio, laborajn kunvenojn de monda kaj respublika organoj de KELI, renkontiĝojn de malnovaj amikoj kaj ekkonojn de novaj, kaj belegan etoson. Tiel ni ricevos etan bildon de la kunveno. Al la kongresoj estas invitataj ĉiuj, kiuj konas Jesuon Kriston aŭ serĉas la spiritan vojon. Sekva kongreso estas ekumena kaj okazas en Pelplin apud Gdańsk (Pollando), la 20-an –28-an de julio 2007.

*vaclpospisil@seznam.cz*

# Lančov 2007



En 2007 okazos jam la 55-a SET, sed nur du etapoj:

1-a etapo: 1.7. – 14.7. 2007

2-a etapo: 15.7. – 28.7. 2007

Anstataŭ la tria etapo oni planas unusemajnan seminarion pri **Laboro por Esperanto en la kondiĉoj de la nuntempa mondo** kaj fine de tiu semajno la 4-an de aŭgusto 2007 realiĝos **Solena renkontiĝo de ekstendaranoj kaj amikoj okaze de la jubilea 55-a tendaro.**

## Interesa renkotiĝo en Tovačov

La 30-an de septembro 2006, okazis en la ĉarma urbo Tovačov Esperanta renkontiĝo, kiun aranĝis EK Přerov. La renkontiĝon partoprenis pli ol 20 personoj el 3 urboj (Přerov, Prostějov, Brno).



Interesa estas, ke la teritorio en Tovačov estis loĝatigita jam en la meza bronzepoko (t.e. ĉirkaŭ 1 000 jarojn antaŭ Kristo). De la jaro 1321 jam ekzistas mencioj pri la urbo. En la historio famigis la urbon la dinastio de Cimburk. La loka kastelo estis origine gotika, sed en la 15-a jarcento ĝi estis rekonstruita kiel renesanca akva burgo. En la jaro 1492 estis finkonstruita 96 m alta turo, kiu elstaras super la kastelo kaj la urbo. La enira portalo havas imponan ŝtonan arkitekturon kun enskribo de sia konstruo, t.e. 1492.

Post trarigardo de la belega interiero de la kastelo oficiala ĉiĉerono informis la partoprenintojn pri bataloj de aŭstra-prusa milito. Inter Tovačov kaj Dub okazis en la jaro 1866 unu el la lastaj bataloj, kiun partoprenis ambaŭflanke pli ol duonmiliono da batalantoj. Ĉirkaŭ la urbo tion memorigas diversaj monumentoj kaj ĉiujara memorpromeno tra la batala loko. Sekvis promeno al la fiŝlago „Kolečko“ kaj de tie promeno preter la kastela valo ĉirkaŭ centjaraj kverkoj al fiŝlago „Hradecký“.

Post fotado la partoprenintoj kolektiĝis en loka gastejo por refreŝiĝi, sed ankaŭ por babili pri diversaj temoj. Al bona humoro kontribuis bonega somera vetero kaj entute bona etoso.



*Antaŭ la kastelo*

Kelkaj havis eblecon utiligi inviton de EK prezidanto s-ano Krejčíř kaj vizitis proksiman vilaĝon Troubky, kiu estis antaŭ kelkaj jaroj suferigita de inundo. Nun jam oni ne vidas, ke tie iu inundo okazis. Post kafumado ĉe familio Krejčíř, la belega renkontiĝo finiĝis.

Samtempe en proksima parto de Přerov, Žeravice, estis solene malvualita memortabulo dediĉita okaze de neĝisvivitaj 80 jaroj de tiama



samurbano **Václav Halíř**, kiu estis solisto de Janáček-opero en Brno kaj kiu estis granda favoranto de Esperanto kaj ofte per siaj kantoj pliriĉigis Esperantajn programojn ĉe diversaj okazoj, ankaŭ dum UK en Prago. Pri la solenaĵo raportis loka televido.

En loka gazeto aperis longa artikolo sub titolo *Podzimní setkání esperantistů na zámku Tovačov* (Aŭtuna renkonto de esperantistoj en la kastelo Tovačov). *vp*

## Esperantista renkontiĝo en Svitavy

Sabate la 7-an de oktobro 2006 la Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy aranĝis tradician renkontiĝon. Partoprenis ĝin 27 gesamideanoj el 11 kluboj. Antaŭtagmeze ili vizitis kun urba historiisto Mgr. Radoslav Fikejz la preĝejon de Sankta Egidio (Jiljí) en la loka tombejo. Sinjoro Fikejz al ili rakontis pri ĝia historio. Poste partoprenantoj vizitis Urban Muzeon, kie ili trarigardis ekspozicion pri la vivo de Valentin Oswald Ottendorfer kaj lian bibliotekon. Tie estis ankaŭ libroj el la loka sinagogo, kiun faŝistoj detruis dum la dua milito. La plej malnova libro estis el la dua duono de la 16-a jarcento. Valentin Oswald Ottendorfer naskiĝis en Svitavy, sed poste li vivis en Usono. Li posedis eldonejon de gazetoj. En Svitavy li konstruis ekzemple hospitalon, bibliotekon, orfejon kaj lernejon.

Posttagmeze partoprenantoj povis legi en la nova urba kroniko. La urbo Svitavy ĉijare festas 750 jarojn. Unu el du aŭtoroj de la kroniko estas historiisto Mgr. Fikejz. Samideano Kvido Janík rakontis pri sia vojo tra centra Ameriko. Libuše Dvořáková konatigis la partoprenantojn kun programo de la septembra konferenco de ĈEA en České Budějovice. La kluboj planis aranĝojn por la venonta jaro.

*Libuše Dvořáková*



# Ekspozicio pri Esperanto

De la 2-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro 2006 realiĝis en Nigra Turo de Drahoňovice ekspozicio de Gabriela Hrochová el Čechy pod Kosířem (ŝi estas nia eksklubanino) - la ekspozicio havis temon ”Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo” kaj estis kompletigita per ekspozicio de lignaj krajonoj. La kluba komitato vizitis la ekspozicion la 1-an de oktobro kaj aprezis ĝin kiel bone preparitan aranĝon.

*Jaroslav Liška, EK Prostějov*



*La Nigra Turo en Drahoňovice*



*Ekspozicio pri Esperanto*



*Ekspozicio de krajonoj*

## Ekspozicio de Věroslav Bergr



Amiko de Esperanto, pentristo kaj grafikisto Věroslav Bergr, edzo de poetino Zdenka Bergrová (Esperanto-tradukoj de ŝiaj poemoj estas de li ilustritaj), ekspoziciis dum novembro 2006 siajn oleo-pentraĵojn el la jaroj 1959-1970, inspiritajn de la Mahlera muziko, en *Galerio Ztichlá klika* ĉe la Betlehema placo en Prago (la galerio, situanta en subterena etaĝo, servas samtempe kiel librobrokantejo pri pentroarto).

# Raporto pri agado de Ĉeĥa landa sekcio de IFEF ĉe FISAIC ČD de post la jarkonferenco 2005

Ĉeĥa landa sekcio de IFEF ĉe FISAIC ČD estas unu el 21 landaj asocioj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF).

Al ĉefaj punktoj de ĝia agado apartenas aktiva partopreno en la ĉiujaraj kongresoj kaj aliaj aranĝoj de IFEF kiel IFES (vintra skisemajno), Fervojista Koresponda Servo, organizado de du konferencoj jare, partopreno en lingvaj E-kursoj kun celo plialtigi lingvan nivelon, organizado de fakprelegoj, partopreno en terminologia laboro de Terminara Komisiono de IFEF, organizado de ekspozicioj, verkado kaj tradukado de fakaj tekstoj kaj gvidtekstoj por fervojaj muzeoj, preparado de informartikoloj por la publiko k.t.p.

La pasinta jarkonferenco okazis ekde la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 2005 en Ústí nad Labem. Estis elektita komitato por trijara periodo. La ĉeestantoj kune kun eksterlandaj delegitoj el 5 landoj partoprenis en du fakaj ekskursoj. Dum la unua estis vizitita historia fervojo kaj fervoja muzeo en Zubrnice, la alia estis vizito de unika muzea ekspozicio en la ĉefa stacio de Děčín, Regejo 15 Nordo, kun altnivela faka komentario fare de inĝ. Ivo Láníček. Ĉiuj partoprenantoj krome ricevis (kiel ordinare) preparitajn tekstojn pri la vizititaj lokoj kaj ambaŭ vizititaj urboj en Esperanto.

Kelkaj niaj membroj aktive partoprenis en la konferenco de ĈEA en Vyškov, kie inter honorigitoj fare de ĈEA estis ankaŭ nia membro Ludvík Chytil.

En la 47-a IFES ekde la 5-a ĝis la 11-a de februaro en Bansko (Bulgario) partoprenis unu nia membro.

En la Printempa estrarkunsido de IFEF 12/14-an de aprilo 2006 en Port-Bail, Francio partoprenis du niaj delegitoj.

En la 58-a IFEF-kongreso de la 6-a ĝis 13-a de majo 2006 en Ŝanhajo kaj en la postkongreso en Pekino pro altaj vojaĝkostoj partoprenis sole nia prezidanto kiel ĉefkomitatano de IFEF. Li estis reelektita kiel ĉefkomitatano por la periodo 2006-2009. Por la sama periodo estis reelektita ankaŭ nia membro inĝ. Ladislav Kovář kiel sekretario de Fake Aplika Sekcio de Faka Komisiono de IFEF; plie li sukcese plenumas la funkcion de la redaktoro de neregula informilo Fervojfakaj Kajeroj, eldonata de IFEF. Alia nia komitatano inĝ. Zdeněk Polák aktive partoprenas en la laboro de la Terminara sekcio de IFEF kaj kunlaboras kun ĝia gvidanto D-ro Heinz Hoffmann (Germanio), krome redaktoro de Terminara Kuriero.

En la tagoj de la 9-a ĝis la 11-a de junio 2006 estis aranĝita Printempa konferenco en Pardubice, en kiu partoprenis gastoj el Aŭstrio kaj Bulgario. Estis prezentita detala raporto pri la 58-a IFK en Ĉinio (kun lumbildoj), okazis ekspozicio kun memoraĵoj pri la kongreso kaj pri Ĉinio, prelego pri trafiko en la regiono Pardubice kaj faka ekskurso en Muzeo kun ekspozicio de la interkomunikada kaj sekuriga teknikoj en Hradec Králové.

Laŭ invito du niaj membroj partoprenis en la 38-a Landa Amika Renkontiĝo de la hungaraj fervojistoj en Tokaj kun vizito de vinkeloj kaj gustumado de la famaj Tokajaj vinoj, ŝipekskurso al Sárospatak kun vizito de la Rákoczi fortikaĵo, urba biblioteko kaj Kolegio de Hungara reformacia eklezio, kie en 1650-54 vivis kaj instruis Jan Amos Komenský.

Kelkaj niaj membroj partoprenis en la 59-a kongreso de IKUE en Velehrad, tri eĉ laboris en la Kongresa organiza komitato.

La sekcio dum la pasintaj du jaroj vigle kunlaboris kun la refondita Pola Fervojista Esperanto-Asocio, du niaj reprezentantoj dum aŭgusto vizitis Varsovion kaj Bjalistokon por trakti kun polaj kolegoj kaj gvidantoj de la Pola Fervojista Asocio "Kolejarz" cele helpi organize en preparado de la 60-a IFEF-kongreso en 2008 en Pollando. Kvinopo de niaj membroj partoprenis en la 18-a Kongreso de Fervojistoj Esperantistoj okazinta ekde la 1-a ĝis la 3-a de septembro 2006 en Siedlce kun riĉa kultura programo.

La prezidanto kiel ĉefkomitatano de IFEF partoprenis en la aŭtuna estrarkunsido de IFEF en Arnoldstein (Aŭstrio) kaj en la sekva renkontiĝo de geesperantistoj de la Adriatika regiono sur la montosupro de Dreiländereck (la 10-an de septembro 2006), en kiu partoprenis geesperantistoj el sep landoj kaj dum kiu slovenia televido el la urbo Kranj intervjuis la IFEF-estraranojn kaj aliajn partoprenantojn kaj poste marde vespere (la 12-an de septembro) elsendis 20-minutan programon favoran al Esperanto.

Laŭ invito de aŭstriaj kolegoj kelkaj niaj membroj aliĝis por partopreni en solena inaŭguro de la renovigita Esperanto-monumento en Linz mardon, la 3-an de oktobro 2006, je la 14-a horo kaj en la tutlanda konferenco de AFEF ekde la 6-a ĝis la 8-a de oktobro 2006 en Vieno.

Ni volonte akceptos en nia sekcio novajn membrojn, kun celo disvastigi kaj apliki Esperanton en la fervojaj administracioj, kaj en la fervojistaj medioj kaj rondoj, precipe aktivajn fervojistojn kaj aliajn trafikistojn. Se vi konas tiajn kaj se ili ne estas ankoraŭ niaj membroj, bonvolu informi ilin. Pli detalajn informojn vi povas ricevi de la sekretariino PhDr. Anna Abelovská, prezidanto Jindřich Tomíšek aŭ kasisto Ladislav Špína. Kontaktojn al la komitatanoj de la Ĉeĥa sekcio de IFEF oni povas ricevi ĉe la telefonnumero 97 22 32569 (Inĝ. Šmerhová) aŭ pere de la interreto: Tomisek.ck@seznam.cz (prezidanto) aŭ laspespero@seznam.cz (kasisto).

*Jindřich Tomíšek*

## Grava atingaĵo de la E-movado

Esperanto estas ene de la hungara ŝtata lingvo-ekzamensistemo kaj tiel ĝi estas la unua, kiu konformas al la novaj Eŭrop-uniaj normoj. Ekde septembro 2006 lingvokono de Esperanto estas same mezurebla kaj estas egalrajte agnoskata, kiel la aliaj fremdaj lingvoj. La baz-, mez- kaj supergradaj ekzamenoj estas alĝustigitaj al la 6 niveloj (A1-C2) laŭ la skalo de la Konsilio de Eŭropo.

*laŭ RET-INFO*

# Nebojte se přednášet

Propagaci esperanta nikdo za nás neudělá a věříme-li v jeho užitečnost, nezbývá, než se o ni postarat sami. Snad se vám budou hodit některé informace o tom, jak si připravit a pak přednést přednášku. Úvodem bych chtěl říci, abyste stále měli na mysli, že

- tréma je normální věc a jak začnete přednášet, tak se sama ztratí,
- posluchači nejsou nepřátelé, nebojte se jich! Když se přebreptnete, váš kiks přijmou, stáváte se tímto jedním z nich a ne ten, kdo chce poučovat. Zkrátka, stáváte se kámošem, kámoškou. Věk nerozhoduje.
- máte-li tahák, nestyďte se za něj. Je pohodlnější mluvit podle poznámek, než číst text, ve kterém můžete snadno přeskočit řádek,
- máte radost, že máte možnost vyprávět o tom, co vás zajímá. Posluchače to také zajímá, a proto si vás přišli poslechnout.

**Něco o přednášce.** V podstatě jsou dva druhy přednášek, totiž **informativní** a **přehledové**.

V *informativní* přednášce mluvíme např. o finanční situaci spolku, o výsledcích měření nějakého experimentu atd. V těchto případech doporučuji před přednáškou napsat potřebná fakta např. na tabuli, nemohu-li je opticky zobrazit - promítnout. Za *přehledovou* přednášku považuji např. sdělení o činnosti spolku či o pobytu na kongresu apod. Zde doplňující obrázky a tabulky jsou přínosem...

Uvedeným rozdělením bych chtěl naznačit, jak by se mělo uvažovat při psaní konceptu přednášky. Zvážit, jací budou posluchači, co jim a v jakém rozsahu či podrobnostech chci sdělit. Při přednášce se nenechte vyrušovat dotazy. Nejste ve škole. Na dotazy je čas po přednášce. Délku přednášky určuje pořadatel akce. V každém případě si přednášku předem napište. Tzv. normalizovaná stránka strojopisu (60 úderů, tj. písmen i mezer na řádku a 30 řádků na stránce) reprezentuje asi 3 min. předneseného textu.

Jak jsme se učili ve škole, přednáška by se měla skládat ze tří částí: úvod, stať a závěr. V úvodu v jedné či ve dvou větách se řekne, o čem se bude dále mluvit. Stať věnujeme danému tematu, důležitá fakta zdůrazníme a mezi ně vložíme "zajímavosti", aby si posluchač "odpočinul". Nezabíháme do detailů, není-li to nezbytně nutné. Ty nechť jsou v písemném textu např. ve sborníku, nebo se jim věnujeme při diskuzi. V závěru stručně zopakujeme, co jsme řekli, aby ti, co spali, věděli, o co šlo. Zbude-li čas a souhlasí-li organizátor akce, požádáme posluchače o dotazy.

**Příprava na přednášku.** Je výhodné mít přednášku napsanou asi dva týdny předem. Pak využijte každé volné chvilky a představte si, že tu přednášku - bez papíru - přednášíte. Mluvte "v duchu" či šeptem. To můžete dělat při cestě do práce, při oblékání či čekání na partnera... Kdykoliv a kdekoliv. Zkrátka, říkejte si, co jste napsali a do textu se podívejte, zda jste něco nezapomněli, třeba až večer doma. Brzy poznáte, že věty v písemném projevu jsou zbytečně dlouhé, že posluchač může ztratit souvislost a že hovorový projev je pro přednes výhodnější. Zkuste si doma říci přednášku nahlas. Že váš hlas bude znít dutě, je pochopitelné, v místnosti jste sami. Tak zní i ve velkém sále. Jsou-li posluchači, hlas zní jinak.

Jak před hlasitým přednesem, tak při nácviku přednášky "v duchu" se hluboce nadechněte a zhluboka dýchejte. Mluvíte-li nahlas, či potichu, nespěchejte! Nikdo vás nehoní, nikoho nehoníte, nic vám neuteče. Je lépe říci méně, jasně, aby si posluchači podstatné zapamatovali, než je zavalit spoustou informací. Mezi odstavci udělejte krátkou pauzu, protože v každém odstavci obvykle začíná nová myšlenka, informace apod.

Představte si, že už mluvíte před posluchači. Poznáte, že vás nesežerou, vždyť jsou jen ve vaší představě. Tím si vytvoříte v sobě obranu před skutečnými posluchači. Zkrátka, už na ně budete připraveni. Máte-li možnost někomu přednášku či její část říci, využijte to! Poznáte na něm, zda ho to zaujme - dle reakce přednášku upravte. Vždyť i spisovatelé pohádek je testují na svých dětech a romány v prvním čtení hodnotí manželky...

**Před vystoupením**

- moc nejezte - žaludek by odčerpal krev z mozku a zívali byste,
- vejděte do prázdného sálu, stoupněte si na místo, odkud budete přednášet a prohlédněte si sál. Dýchejte zhluboka, klidně a zjistíte, že strop na vás nepadá, podlaha se nechvěje, že ten sál není vůbec velký, a vězte, že posluchači budou přátelé, kteří za vámi přišli.
- Překontrolujte, zda diapozitivy, průsvitky, ukazovátko a jiné technické prostředky máte v pořádku, zda světlo na řečnickém pultíku svítí a zda mikrofon není příliš nizko. (Při předklonu brzy začnou bolet záda!)
- Nejméně 20 minut před přednáškou se už o ni vůbec nestarejte!

**Při přednášce**

- Postupujte podle klíčových slov daného textu, nebo zvýrazněných termínů anebo text čtěte, což moc nedoporučuji.
- Dívejte se po posluchačích, po celém sále. Postřehnete-li, že klesá jejich pozornost, přejděte hned k další informaci, myšlence. Oni si toho určitě nevšimnou...
- Zapojte posluchače do svých vývodů. Posluchače nezajímá, co všechno víte, ale co všechno užitečného z vaší přednášky můžou získat.
- Posluchači jsou "jen lidé" - rádi prominou drobné nedostatky. Přílišná dokonalost může vyvolat spíš odmítavou než příznivou reakci.
- Pomáhejte si různými pomůckami, jako jsou obrázky, tabulky, průsvitky, klíčová slova ... to vám usnadní přednášení a může i přednášku zachránit.

**Pár poznámek na konec**

- Mluvte o něco hlasitěji. Nejistý člověk drmolí a mluví o něco tišeji,
- pohybujte se uvolněně, celými pažemi pohybujte. Nejistý člověk pohybuje pouze rukama a to nepůsobí dobře. Držíte-li mikrofon, můžete odejít od řečnického pultíku a dle potřeby pocházet po podiu. Někoho to uklidňuje a lépe se mu přednáší, zvláště, když mluví o textu zobrazeném na tabuli.
- Bezpodmínečně udržujte vizuální kontakt se všemi posluchači. Nedívejte se na strop ani z okna (to působí arogantně) či na podlahu (posluchač si to vyloží jako projev nejistoty).
- Mikrofon držte tak, jak to vidíte v televizi u reportérů. Nedávejte jej těsně před ústa jako zpěváci. Nechcete si přece do něj kousnout.

*(dokončení na str. 125)*

# Ni kondolencas

- la 4-an de junio 2006 forpasis **Mária Francová** (nask. 13.7.1924) el Pardubice, edzino de honora membro de ĈEA Karel Franc.

- la 19-an de septembro 2006 mortis **Oldřich Vykoukal** el Ostrava-Poruba (nask. 8.6.1953)

- la 1-an de oktobro 2006 mortis **Josef Petera** el Dvůr Králové en aĝo de 58 jaroj (nask. 11.9.1948).

- la 3-an de novembro 2006 forpasis **Oldřich Antoš** el Děčín en aĝo de 73 jaroj, fervojisto, esperantisto kaj membro de fratara eklezio. Kun sia edzino Marta li adoptis kaj edukis du romaajn knabojn, kun kiuj li plurfoje vizitis SET Lančov.

# William Auld

(1924-2006)

La 11-an de septembro 2006 por eterne silentiĝis la plej granda Esperanto-poeto William Auld, honora membro de UEA, skoto laŭ nacieco.

En la originalan literaturon li enskribiĝis precipe per poemego *La infana raso*, sed ankaŭ per *Rimleteroj, Unufingraj melodioj* kaj aliaj. Multaj el ni finlernis Esperanton laŭ lia internacia lernolibro *Paŝoj al plena posedo*. Li apartenis ankaŭ al niaj plej grandaj tradukantoj: *La Mastro de l' Ringoj* (Tolkien), *La sonetoj, Epifanio* kaj *La komedio de eraroj* (Shakespeare), *La graveco de la Fideliĝo* (Wilde), *La ĉashundo de la Baskerviloj* (Doyle) k.a.



Li redaktis plurajn antologiojn (inter ili la anglan, skotan kaj *Novan Esperantan Krestomation)* kaj gazetojn (*Esperanto en Skotlando, Brita Esperantisto, Fonto, Esperanto, Norda Prismo*), plenumis gravajn movadajn funkciojn kaj postenojn (vicprezidanto de UEA, prezidanto de Akademio de Esperanto, honora prezidanto de Esperanta PEN-Centro). Li fariĝis unu el la plej grandaj figuroj en la historio de nia movado.

*(dokončení ze str. 124)*

- A konečně nezapomeňte na prostou větu: "Děkuji za vaši pozornost", nebo "Bylo mi ctí, že jsem se mohl podělit o své zkušenosti" apod. Slušnosti není nikdy dost. Závěrem vám přeji pocit radosti z přednášení a znovu opakuji: nebojte se trémy, ale zlých psů a lidí.

*Viktor Dvořák*

# KALENDARO 2007

■ ***30.5.-3.6.2007: La 5-a kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj***. *Seč (30 km sude de Pardubice). Informoj: aeh-ikeh@volny.cz*
■ ***30.6.-6.7.2007: Ekoturisma renkontiĝo por pied-turistoj kaj biciklantoj.*** *Radošov apud Karlovy Vary, Informoj: chrdle@kava-pech.cz*
■ ***1.7.-28.7.2007 Du etapoj de SET Lančov***
■ ***29.7-14.8.2007: Komuna flugo al la 92-a Universala Kongreso al Jokohamo*** *(Japanio). Informoj: chrdle@kava-pech.cz*
■ ***12.-16.9.2007: Konferenco de IKEK*** *(Internacia Kolektivo de Esperantistoj-Komunistoj), Dobřichovice, inf.: dieter.rooke@tiscali.ch*
■ ***21.-23.9.2007 Konfenenco de ĈEA (Polička)***
■ ***24-30.9.2007: Internacia Paroliga Semajno (InPaSem)****, kurso de Esperanto por komencintoj kaj lingva seminario por jamaj parolantoj, Dobřichovice. Informoj: chrdle@kava-pech.cz*
■ ***7.10.2007 Renkontiĝo en Svitavy***

## *Komune al Japanio pro UK*

Kongresa agentejo KAVA-PECH kune kun *Chinatour* (vojaĝoficejo specializita al Ĉinio, Japanio kaj la ceteraj landoj de Fora Asio, kiu kunlaboris ankaŭ dum la karavano al la UK en Pekino) invitas vin al la komuna esplorado de la plej famaj lokoj en Japanio lige al la 92-a UK en Jokohamo. Dum la turisma programo nin gvidos profesia ĉiĉerono de *Chinatour* parolanta la japanan.

La 17-taga karavano startos el Prago la 28-an de julio 2007, celante al Osaka-Kansai. De tie transporto al Kjoto per la ekspreso Haruka kaj loĝigo en la tristela hotelo Palace Side centre de la urbo apud la Imperiestra palaco. En tiu hotelo oni restos ĝis la forveturo al Jokohamo kaj de tie oni esploros la vidindaĵojn de Japanio vojaĝante ĉiam per superekspreso Ŝinkanzen aŭ ekspresaj trajnoj havante sidlokbiletojn. Ni nomu el la vizitotaj lokoj almenaŭ la iamajn ĉefurbojn de Japanio Kjoto kaj Nara kiuj apartenas sendube al mondfamaj kulturaj perloj, sed oni vizitos ankaŭ la urbon Hiroŝima, la plej faman kastelon Himejdĵi kaj por refreŝiĝi povos bani sin en la plej granda japana lago Biwa.

La 4-an de aŭgusto oni translokiĝos en la du- kaj duonstelan hotelon *Toyoko Inn* konvene lokita al la kongresejo. Dum la ekskursa tago nia karavano konatiĝos kun la plej interesaj vidindaĵoj de la ĉefurbo Tokio. Post la kongreso, la 12-an de aŭgusto estos libera tago, tamen, se estos sufiĉe da interesatoj ni strebos organizi la grimpadon al la pinto de la sankta monto Fuĵi.

La prezo de la tuto sen la UK-kongreskotizo, sen la flugbiletoj kaj sen manĝado krom matenmanĝoj (sed kun ĉiuj transportkostoj krom funikularo al la sankta monto Misen, kiu estos nedeviga) en dulita ĉambro estas 39800 Kč, la antaŭvidita prezo de la flugo inkluzive de flughavenaj, benzin- kaj sekurec-suplementoj povus ne superi 30000 Kč.

Interesatoj ne forgesu, ke la plej favora UK-kongreskotizo validas nur ĝis la fino de decembro! Pliajn informojn pri la karavano, sed ankaŭ pri la kongreso sen neceso aliĝi al la karavano, vi ricevos ĉe la UK-peranto por Ĉeĥio kaj estro de KAVA-PECH Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, rete chrdle@kava-pech.cz



# Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu:** 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte svoje číslo legitimace a pošlete V. Hiršovi seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřižek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):
**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**50200** sekce železničářů IFEF
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI, b. ú. u Poštovní spořitelny č. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio

La 17-an de decembro 2006 aperas en Israelo la unua poŝtmarko kun la temo **Esperanto-Zamenhof** kune kun unutaga porokaza stampo.

*laŭ RET-INFO*

# Zájemci o časopisy

## důležitá změna!

Předplatné časopisů zajišťuje: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhraďte na účet u České spořitelny v Poděbradech, č.ú. 0017 011 013/0800, konst. s. 0379 a variabilní s. uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 890,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4
**La Gazeto:** 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** 540,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4
**Juna Amiko:** 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5
**Literatura Foiro:** 1000,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
**Heroldo de Esperanto:** 1080,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3
**Femina:** 660,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A 4
**Litova Stelo:** 300,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5
**Pola esperantisto:** 360,- Kč, v.s. 07009, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

**Periodikum Českého esperantského svazu (37. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz; http://members.chello.cz/malovec/**

**Členská evidence a změny adres:**

**c/o Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz**

**Uzávěrka dalšího čísla**: 1.2.2007

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (37-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

**http://members.chello.cz/malovec/**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 1.2.2007

**ISSN 1212-009X**

## Jako vzpomínku na konferenci ČES v Českých Budějovicích

jsme připravili CD s fotografiemi z konference a s konferenčními materiály. Dále na CD můžete najít fotografie z předchozích akcí, ukázku z filmu s esperantskými titulky, učebnici Theodora Kiliána, PAKEO – esperanto v kostce a ještě něco navíc. Zájemci si mohou CD za cenu 50,- Kč + 25,- poštovné objednat na dobírku na adrese: Aleš Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice TomecekAles@seznam.cz